

Kluba Programo:**julio:**

- 5 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)
- 12 Renato Corsetti (Dioramo): *La prelego, kiun mi neniam estus volinta fari: UEA mortis. Vivu UEA!*
(1800h Konsilantaro)
- 19 Lingva vespero – (IBIS Shoreditch)
- 26 John Wells: *Lingva seminario* (Dioramo):

aŭgusto:

- 2 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)
- 9 Terry Page (Diorama): *“Bovinoj betonaj”, “cirkloj centopaj” – ĉu nenio alia en Milton Keynes?*
- 16 Lingva vespero – (IBIS Shoreditch)
- 23 John Wells: *Lingva seminario* (Dioramo):
- 30 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)

septembro:

- 6 Lingva vespero – (IBIS Shoreditch)

12a-julio: UEA mortis. Vivu UEA!

Ne ĉiuj ankoraŭ konscias pri tio, ke UEA deklaris laŭ la nederlanda leĝo staton de ekonomia krizo kaj komencis proponi al la oficistoj reduktion de la labor-tempo kaj de la salajro. Nederlanda juĝisto devos decidi kion fari pri la oficistoj, kiuj ne akceptas la novajn kondiĉojn. La prelego provos klarigi, kial oni alvenis al ĉi tiu punkto. Estos prezentataj ankaŭ kelkaj ideoj pri la postaj paŝoj bezonataj por atingi finanĉan ekvilibron. Ni kaptu la ŝancon por eliri el la krizo kun daŭropova UEA, kiu daŭre gvidu la tutmondan movadon en la nuna jarcento. **R.C.**

Esperanta Kalendaro:

20 – 27 jul: 104a Universala Kongreso de Esperanto – Lahtio, Finnlando
<http://uea.org/kongresoj>

26 jul: Esperanto-Tago <http://www.linguistic-rights.org/esperanto-tago/esperanto-tago-2019.html>

4 – 11 aŭg: 92a SAT-Kongreso Barcelono, Hispanio. kontakt@satesperanto.org

Informo pri tre multaj aranĝoj troveblas ĉe:
<http://www.eventoj.hu/2019.htm>

**La sesio de la KER-ekzamenoj en Londono la 15-an de junio sukcese okazis**

De kiam oni komencis lanĉi la KER-ekzamenojn en Londono, oni sukcesis havi ĉiujare pli kaj pli da kandidatoj. Ĉi-jare estis 11 el la tuta Britujo, eĉ el Skotlando kaj ankaŭ unu el Francujo.

Dankon al la Londona Esperanto-Klubo, en kies medio maturiĝis la ideo pri oferto de tiu ekzameno en Londono kaj multaj el kiuj membroj partoprenis ilin.

Dankon al EAB, la brita landa socio de UEA, kiu finance subtenas la ekzamenojn per repago de granda parto de la ekzamen-kotizo al la sukcesintoj.

Dankon al Marteno Miniĥ, membro de LEK, danke al kies teĥnikaj kapabloj eblas mastrumi la ĉiam pli malsimplajn retajn postulojn.

Dankon al Katalin Kovats kaj al la centraj ekzamenantoj, kiuj montriĝas komprenemaj pri niaj fuŝoj.

La ĉi-jara sesio okazis en Indian YMCA kaj la urbestro de Londono Zadiq Khan sendis siajn bondezirojn al la kandidatoj.

Al la venontjara sesio!

Renato Corsetti

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a aŭgusto por mencio en la sekva Kluba Bulteno.

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Old Diorama Arts Centre, 201 Drummond Street,
NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Ibis London City - Shoreditch Hotel, 5 Commercial St,
London E1 6BF (por diskutvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:
18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ konsilantar-kunsido
19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero
20:15 - 20:45 paŭzo
20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la
ĉefprogramero
22:00 fino


Dioramo: Metrostacio: Warren St (linioj "Victoria",
"Northern"), Euston Square ("Hammersmith & City",
"Circle"), Regents Park ("Bakerloo").
Fervojo London Overground: Euston
Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205, 390,
453, C2.
Ibis (Shoreditch): Metrostacio: Aldgate East - uzu la
eliron nro 2 (Toynbee Hall); (linioj "Hammersmith &
City", "District"); Aldgate (linioj "Circle"
"Metropolitan").
Busoj: 15, 25, 67, 115, 135, 205, 254.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo: <http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346
rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo
020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk. Nordlondona
Sekcio de LEK: Anthony Bodineau anthony@esperanto.org

Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre); Sudorienta:
Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14
7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.



Letero de nia Prezidanto

Saluton

Bonvenon al somero!
Tamen, laŭ la vetero oni
ne divenus tion, ke estas
nun somero. Mi esperas,
ke la vetero estos taŭga
por nia promeno la 28-an
de junio.



Legante pri la okazintaj eventoj de LEK, mi estis
trafita de multaj aferoj. Mi estis trafita de la kvalito,
certe, kaj mi certas, ke tiuj, kiuj ĉeestis la eventojn,
konsentos pri tio. Sed ne nur la kvalito, sed ankaŭ la
diverseco trafis min. En LEK, okazis, inter aliaj aferoj,
prelego pri muzik-terminoj, legado de traduko de
Chaucer, ateliero pri trikado. Tre diversa, ĉu ne?

La 16-an de junio okazis KER-ekzameno en Londono,
kaj mi certas, ke vi taksos ĝin granda sukceso. Vi
povas legi pri ĝi en la raporto en ĉi-tiu bulteno, sed mi
deziras grandan sukceson al ĉiuj ekzameniĝintoj. Ni
raportos pri la sukcesoj en estonta bulteno! Dankon al
Renato kaj Marteno pro ilia prizorgado de la
ekzameno.

Baldaŭ okazos la internacia Esperanto-Tago. La 26a
de julio estas la datreveno de la eldono de la Unua
Libro, kaj oni festas ĝin kiel naskiĝtagon de
Esperanto. Mi deziras al vi bonan Esperanto-Tagon,
kaj esperas, ke vi povos festi ĝin kun ni en LEK.

Denove, ni havas interesan programon dum la
sekvontaj du monatoj, kaj mi esperas, ke ni vidos
multe da vi en kelkaj eventoj!

Chris Lewis



Funkciuloj: Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.
Konsilantaro: Chris Lewis (Prezidanto), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Renato Corsetti
(Sekretario), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Antony Rawlinson (Bultenisto), Roland England, Terry Page.
Adresoj: Renato Corsetti: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ
ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP anica_page@btinternet.com,
Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.